Turisma kaj lingva seminario
en Bahratal

Meze de junio (08.-11.06. 2007) okazis turisma kaj lingva seminario en Bahratal ĉelime inter Saksio kaj Bohemio,

Kultura kontribuo: kantado kaj tamburado.

organizita de la Esperanto-grupo Saksa Svisio kiu omaĝis al la 100-jara Esperanto-movado en la distrikta ĉefurbo Pirna.
La 24 partoprenintoj (inter ili 5 ĉeĥoj) loĝis meze de arbaro en finnstilaj kabanoj. Antaŭtagmeze la spertaj Espe-

La gastoj apud la seminariejo.

ranto-instruistoj Miroslav Malovec kaj Dr-o Benoit Philippe en du grupoj lerte paroligis nin. Posttagmeze ni migradis tra la pitoreska arbaroriĉa limregiono inter Saksa-Bohemia Svisio kaj Bohemia Mezmontaro.
Vespere ni serioze (kun sciencaj klarigoj pri la sanigaj efikoj) trinkis bieron kaj ginseng-teon. Multaj aliaj interesaj diverstemaj prelegoj riĉigis la programon.

Frank Nitsche

100 jaroj Esperanto
en Aŭgsburgo

La loka lingvoklubo festos centjaran jubileon kadre de la printempa kunveno de Bavara Esperanto-Ligo, la 2an ĝis la 4a de majo 2008.

Aŭgsburgo ofte gastigis Esperanto-okazaĵojn: fakajn, lokajn, regionajn landajn, naciajn kaj internaciajn renkontojn kaj kongresojn kiel ekzemple la Universalan Kongreson en 1985. En 2008 la loka Esperanto-Lingvoklubo organizos festaranĝon kiu okazos en la konferenca centro (Tagungszentrum) DIAKO, tre proksime al la ĉefstacidomo (5 ĝis 8 minutojn piede). Tiu centro apartenas al malsanulejo Evangelische Diakonissenanstalten kaj troviĝas en bela, trankvila parko, tamen meze en la urbo. Ĝi ankaŭ disponas pri propra parkdomo. Pluraj parkdomoj estas tre proksime. Parto de DIAKO estas hotelo kun 34 unulitaj kaj dulitaj ĉambroj kun duŝo, necesejo, TV. Partoprenantoj kiuj deziras tranokti tie devas anonci tion ĝis la 31a de januaro 2008. Poste ni ne plu povas garantii liberan ĉambron en DIAKO-hotelo. Aliaj tranokteblecoj ankaŭ ekzistas sufiĉe proksime al la renkontejo. Kiu deziras preni unu el tiuj tranokteblecoj devas mem mendi. La organizantoj estas kompreneble pretaj doni konsilojn/adresojn.
La urba administracio de Aŭgsburgo tre bonvoleme kaj afable akompanas nian tiucelan aktivecon. Kvankam mallonge antaŭ nia aranĝo okazas novelektoj de la urba parlamento oni pretas subteni kaj akcepti nin.
Ni klopodas publikigi nian kompletan programon post la komuna kunsido de la loka klubo kaj la BELO-estraro en aŭgusto.
Jen la jam konkretaj programeroj:
akcepto de la partoprenantoj en la urbodomo de Aŭgsburgo, sabaton, la 3an de majo 2008, je 09h30, kunsido(j) de la BELO-estraro, laŭeble kunsido de kunlaborantoj de la Germana Esperanto-Instituto sub la gvido de ties direktoro prof. d-ro Martin Haase, membrokunveno de la Bavara Esperanto-Ligo, rondiro en la malnova urbodoma parto sub la titolo „Kun Brecht en la Lechkvartalo“ sub la gvido de J. M. Ipfelkofer, publika festvespero, sabaton, la 3an de majo ekde la 19a horo kun enkonduka prelego de Stefan Maul (rerigardo al 100 jaroj Esperanto en Aŭgsburgo), festprelego (germanlingve) de prof. d-ro Martin Haase, Universitato Bamberg, Esperanto-familio prezentas sin, muzika kadro kun Jacques LePuil, Bourges (franca ĝemelurbo de Aŭgsburgo) kaj kanthoro de Andrea Nußbächer (muzika pedagogino), inaŭguro de la nova Esperanto-renkontejo „Bürgertreff Hochzoll“ kun informoj pri la restaŭrado de tiu malnova lernejo, konversacioj, muziko kaj etaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.
Pluaj informoj kaj detalaĵoj sekvos. Interesuloj kiuj havas demandojn aŭ mendojn turnu sin al: Stefanie Tucker, Breitenbergstr. 7, 86163 Augsburg, Germanio, 0821/664339, fakso 0821/663466, g.tucker@gmx.de

Gerald Tucker

Esperanto-salato
en Herzberg

Je la 30a de junio 2007 granda grupo – homoj el Herzberg kaj el diversaj lokoj en Germanio kaj el Belgio, Nederlando, Hispanio kaj Hungario – gustumis

La estrino de la greka restoracio Akropolis Lamprini Panta, Vassilli Sbonias, Veronika Acsadi kaj Peter Zilvar kun la nova Esperanto-salato.

la unuan Esperanto-salaton en la greka restoracio „Akropolis“ en Herzberg. La nova kreitaĵo enhavas freŝajn verdajn salatelementojn kaj kaprinofromaĝon. Sur la Esperanto-salato troviĝas kvinpintaj steloj el verda papriko.

ICH